# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Tabloludoj

Jam Komenský venis kun ideo Schola Ludus. Lernu per ludoj. Venu merkrede en nian klubejon ludi vortludojn en Esperanto. Mi alportos neniun novan ludon. Se vi preferas iun el la jam ludataj vortludoj (do ne Brno šalinou), skribu al mi. Alie mi mem elektos.

**Kiam:** la 29-an de aprilo 2026 je **18.00** (UTC+2), la klubejo estos malfermita ekde 17.45

**Prelegonto**: Milan Kolka
**Lingvo:** esperanto
**Kie:** Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi estos registrata.

# Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc.
- La 29an — 31an de majo 2026, 37-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, Krakow, Pollando

- La 6an de junio 2026 Ludu kun ni!, Brno, organizas E-mental el Prago
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio
- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

★

# Programo en majo

La 6an **Nia retbutiko**, *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 13an **Nia aĉa vivo**, *diskuto, klubejo. Venu diskuti pri viaj malbonaj tempoj en via vivo kaj kiel vi sukcesis eliri el tio. Ĉu tiu sperto plifortigis vin?*

La 20an **Kion ni legas**. *Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h. La regula rakontado pri libroj en Esperanto, kiujn ni legis. Pripensu jam nun, kiun libro vi prezentos. Se vi nenion legis en Esperanto, komencu legi tuj. Se vi ne havas esperantajn librojn, vi povas ili prunti en Moravia landa biblioteko (Moravská zemská knihovna) en Brno.*

La 27an **Amuzu, lernu kaj ridu** – Josef Vojáček*, klubejo*

---

★

# Programo en junio

La 3an **Naturismo** – Thierry Spanjaard (FR), *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 6an **Ludu kun ni!**, *renkontiĝo*, organizas E-mental el Prago

La 10an **Rostumado**, *renkontiĝo, loko estos precizita*

La 17an *Ankoraŭ ne agordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.*

La 24an **Ekskurso al kastelo Veveří kaj digolago***, renkontiĝo, promeno. Detailoj aperos.*


Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic



Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni